



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jara, n-ro 1

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

NOVA IMPONA VERKO EN LA SERIO „ORIENTO-OKCIDENTO” DE U.E.A.?)

En la belliteraturo de multaj popoloj reliefiĝas kaj ankoraŭ multfoje ludas sian rolon la eposoj kaj epopeoj, rakontaj poemoj plejofte priheroaj. Ilia signifo transpasis la limojn de la regiono kie ili estiĝis kaj tiel ili ne nur influis la verkojn de la propraj aŭtoroj, sed ankaŭ tiujn de aliaj nacioj. Por la lastaj tiuj eposoj formas fonton da ekzercmaterialo por pli aŭ malpli sukcesintaj samritmaj tradukoj kaj da inspiroj por novaj verkoj, tiel liverantaj al la libro-amanta mondo pliajn modelajn volumojn. El tiaj eposoj en Esperanto-traduko plej konataj estas i.a. la pola *Sinjoro Tadeo*, la finna *Kalevala*, la itala *Dia Komedio*, la hungara *La Tragedio de l'Homo*. La vicon pliriĉigis la fruktodona eldono de J. Régulo per la aperigo de la argentina eposo *Martin Fierro*, verko fama en latinameriko, tamen nur supraĵe aŭ tute ne konata en Eŭropo. Krome ĝi estas envicigita en la konatan serion *Oriento-Okcidento* sub aŭspicioj de UEA, el kiu ĝi estas la 5a volumo. La enkonduko de Prof. D-ro Ivo Lapenna ree akcentas la internacian gravecon de tiu elstara serio.

Martin Fierro estas la apogea verko de la argentina ĵurnalisto, politikisto kaj aŭtoro *José Hernández* (1834-1886); ĝi formas la eposon de la nun legendaj praloĝantoj de la „pampo” - la vasta preskaŭ

senlima ebenaĵo de Sudameriko - nomitaj „gaŭĉoj”. Pri la deveno de tiu tipo de homoj nenio certas: fakto restas, ke ili vivis en primitivaj kondiĉoj, estis duonsovaĝaj, krudmanieraj, tutliberaj kaj en ĉiama lukto kontraŭ la disvastiĝanta civilizado kaj kontraŭ la indiĝenoj de la

1 9 6 7

La ĉefestraro deziras al ĉiuj membroj, al ĉiuj Esperantistoj en kaj ekster Nederlando tre feliĉan kaj prosperan jaron.

Esperu ni, ke tiu ĉi jaro alproksimigos Esperanton al la celo, kiun ni ĉiuj deziregas.

Mi esperas, ke la eminentuloj inter ni kun multaj planoj ankaŭ trovos la vojojn realigi tiujn planojn. Oni ne forgesu ke tiuj, kiuj havas la ideon ke ili havas la kapablecon labori pli bone, pli efektive ol la nun funkciantaj estraranoj, ĉiam je ĉiu momento povos transpreni tiujn estraranajn seĝojn.

Mi persone neniam deziras esti bremsonek por Esperanto nek por L.E.E.N. kaj pro tio mi pretas kaj pretos transdoni tiujn mian funkcion al kiu ajn, kiu deziras transpreni ĝin.

Eble tiamaniere 1967 estos la turnpunkto de L.E.E.N. en la postmilita tempo.

H. Kervers.

pampo, la indianoj. Ili havis sian propran ofte severan moralon, defendante ĝin per la preferata armilo, la tranĉilo. Ĉifone vestita, ĉiam surĉevale, socie neligita, la gaŭĉo vagis sola sur la pampo, vivanta de la aĉeto-vendo de la de li kondukitaĵoj brutoj kaj nutrante sin preskaŭ nur per ilia viando. La pampon li konis kiel sian poŝon, pro sia vivo li estis dependa de la tie reganta ofte danĝeriga naturo. Escepte nur li havis familion, loĝantan en kabano aŭ en „la domoj”, t.e. la loĝlokoj de la civilizita mondo, laŭ la slango de la gaŭĉo. La eŭropdevenaj loĝantoj en urboj kaj aliaj loĝlokoj formis la aŭtoritaton de la lando; tiuj malŝatis la malpurajn gaŭĉojn, kiujn ili ĉiel persekutis, klopodis subigi kaj ekstermi, malpermesante eĉ la senrajtigan rajdadon en la pampo, la vivtereno de la gaŭĉo. Okaze de misfaroj la punoj por la gaŭĉoj estis tute despotaj, kruelaj kaj eksterleĝaj. Tiel la gaŭĉoj, ne povante kaj ne volante sin submeti al la por ili nekomprenablaj eŭropismaj moroj kaj kutimoj, formis fakte specon de proskribitoj.

Iliaj lastaj restoj vivis ankoraŭ en la 19a jarcento. Okaze ili venis en la bieno, kie naskiĝis la aŭtoro José Hernández. Kiel infano li vivis kiel gaŭĉo inter la gaŭĉoj. Mem havante ribeleman liberaman naturon, li lernis admirati ilin en ilia memelektita vivado, indigniĝi pro la persekutoj fare de la civilizo; li partoprenis iliajn monotonajn kantojn akompanitajn de la gitaro, kaj tiel enprofundiĝis en ilia vivmaniero kaj lukto, ke en postaj jaroj li decidis verki la eposon de la gaŭĉo. En la daŭro de la tempo tiu libro multe helpis al forigo de maljustaĵoj kaj enradikiĝis inter la argentinaj popoloj, identigantaj sin kun la heroo praloĝantaro. Ankoraŭ nuntempe oni legas kaj relegas la enhavon. Okaze de la morto de la aŭtoro argentina ĵurnalo titolis la novaĵon kiel „Mortis Martin Fierro”.

Kio estas la kaŭzo de tiu populariĝo de la verko? Celtrafe J. Régulo skribis pri tio i.a.: „Temas ĉi tie pri heroo, kiu, kiel Donkiĥoto, vivantiĝis kaj pluiris sola, sendepende de sia aŭtoro. Same kiel Don-

kiĥoto, Martenfero (Martin Fierro) estas la prototipiĝo de la spirito, kiu viglas ĉe la radiko, ĉe la sango de la hispana-latinamerika homo La mesaĝo de Martenfero en Sudameriko estas la sama mesaĝo de Donkiĥoto en Hispanujo. Donkiĥoto en la pampo aŭ Martenfero en Manĉujo estas same adekvataj . . . Gaŭĉoj kaj hidalgos ekzistos ĉiam. De tio la ĉiamdaŭreco de ambaŭ avataroj de la sama heroo, kiuj ja protagonistas la saman eternan aspiron de l'homo al libero kaj justo”.

Krom la jam aludita enkonduko de la U.E.A.-prezidanto antaŭas la eposon priresponda artikolo de la tradukinto kaj prezento de argentina profesoro, kies bona nega enhavo multe helpas al ekkompreno de la gaŭĉo kaj de la eposo. La libro finiĝas per biografio de la aŭtoro; persone mi preferas ke tiaj vivrakontoj aperu en la komenco de la volumo. La bonaj ilustraĵoj de la argentina desegnisto laŭ la 19-jarcenta stilo pliriĉigas la aspekton. Kelkaj preseraroj, tamen ne ĝenantaj, preterglitis la atenton de la korektinto. La eposo dividiĝas en du partoj: la gaŭĉo Martin Fierro kaj la reveno de M.F.; ĝi konsistas el 33 kantoj kun entute 1191 strofoj, plejgrandparte sesversaj, aro da ili estas kvarversaj, dum kelkaj multversaj strofoj memorigas pri la ĥoroj en dramoj de alilandaj poetoj kiel ekz. en Nederlando la poeto Vondel. La enhavo priantas la vivon de la gaŭĉo, liajn heroajn agojn, kavalirecon, amikecon, etrelegiecon, ktp.; aliflanke la lamentadon - kelkloke tedan pro ripeteco - pri la spertitaj nejustaĵoj. Oftfoje la kantoj estas moraliĝaj, kiel ekz. en la verkoj de Shakespeare, ie kaj tie ili atingas altan poezian spiriton, ekz. en la instruaj strofoj de Martin Fierro direktitaj al liaj du filoj aŭ en la kantoj kun la negro. La ritmo iom monotonas, same kiel ofte la vivo de la gaŭĉo kaj kiel liaj iamaj kantoj kun la gitaro.

La originala eposo estas verkita en argentina kampula dialekto kaj preskaŭ ne ekzistas tradukoj en aliaj lingvoj. Tial komparado de la Esperanto-traduko kun

aliaj eldonoj maleblas. Tamen la tradukinto estas konata klera esperantisto kaj laŭ propra aserto plej fidele sekvis la originalan tekston. Li konservis la ritmon kaj deviaĵojn de la originalo: oksilabaj versoj kaj asonancoj. Por redoni la ritmon en Esperanto estis neeviteble ke la tradukinto enkondukis kelkajn nekutimaĵojn ekz.: ellason ie kaj tie de subjekta aŭ objekta pronomo, nekutiman elizion (stas anstataŭ estas), diftongigon de la literoj i en j (pjedo anst. piedo, majzo, djablo, ktp.); ili tamen tute ne ĝenas la leganton kontraŭe, ili similas la parolan lingvon, kaj ofte sukigas la stilon. Tia traduko en la originala ritmo de proks. 8000 versoj estis giganta laboro, meritanta niajn admiron kaj dankon. Tial ne estas kritiko se mi rimarkigas ke, por konservi la ritmon, iuj frazoj estas torditaj kaj ke enkondukiĝis kelkaj nekutimaj vortkunmetaĵoj. La atenta leganto post iom da cerbumo certe malimplikos ilin. Plie estas salutinde kaj estonte imitinde ke la klarigoj estas presitaj piednote.

Honorsaluton kaj dankon al tradukinto kaj eldoninto. La impona verko, plia juvelo inter la lastjaraj eldonoj, meritas vastan disvastiĝon inter la esperantistoj. Espereble la inter multaj el ili manifestiĝanta librofobio ne melhelpos tion.

P. M. Mabesoone.

**MARTIN FIERRO de Joé Hernández, argentina eposo tradukita de Ernesto Sonnenfeld. Enkonduko de D-ro I. Lapenna. Antaŭparolo de la tradukinto. Prezento de prof. Julio Mafud. Apendicio de Juan Régulo Pérez. Ilustraĵoj de Enrique Rapela. Kovrilo de Jan Schaap Jr. - Eldonis STAFETO, belliteratura serio 26. - Volumo n-ro 5 de la serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de U.E.A. - J. Régulo, eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj. Formato 16 x 22 cm., 294 paĝoj. Prezo, nur tolbindita, USA \$ 3,80. Mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.*

ASOCIAJ INFORMOJ

Reĝustigo.

La adreso de la sekretario de la sekcio Den Helder, kiel menciita en „N.E.” en la listo sur p. 104, ne plu validas. La nuna sekretariino estas: F-ino W. C. van Nienes, Pasteurstraat 111, Den Helder.

Donaco por la Mabesoone-Fondajo.

14/12 P. M. M. kaj edzino en H. f 128,25 Koran dankon al la malavaraj gedonacintoj.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Laŭ la programo nia unua distra kunveno en la nova jaro iĝos tre vizitinda. La kunveno okazos lundvesperon la 9-an de januaro je la 8-a h. en De Harmonie, Rustenburg 71C. Ni kaptos la okazon por pritrakti la eventualajn estrarproponojn plialtigi la kotizon.

SKRIBAJ KURSOJ.

En septembro 1966 startis skriba kurso por la tuta lando sub aŭspicioj de F.E.N. kaj de „De Jongerenboerderij”. La lasta estas semjunlara rubriko en la agrikultura semajngazeto „De Boerderij” (La Farmbieno).

La kurso komencis kun 84 partoprenantoj kaj estas la sama, kiun oni ankaŭ uzis i.a. en Zutphen. La kursanoj ricevas stencilitajn lecionojn. Iniciatoro kaj administranto estas s-ro E. J. Woessink, Arnhem. Por la korektado la organizinto ricevas helpon de kelkaj libervoluloj el Arnhem.

En Zutphen oni komencis daŭrigan skriban kurson post la sukcese finita elementa kurso de 1965/1966.

La taggazeto „Het Vrije Volk” promesis publikigi en sia Gelderlanda eldono Esperanto-kurson ekde oktobro de la venonta jaro.

ATENTU:

Sur paĝo 6 grava informo pri Karavano sub aŭspicioj de L.E.E.N. al IZRAELO.

HEROLDO DE ESPERANTO

ĉiam aktuala — 18 numeroj — jarabono 13,50 gld.

Reprezentas: Libro-Servo L.E.E.N.

Borniastraat 95 - Leeuwarden. - Poŝtkonto: 76915.

SIGISMUNDO PRAGANO †

Valorplena vivo, dediĉita al la afero de la mondlingvo estingiĝis la 26-an de novembro, kiam nia ŝatata samideano, la eminenta rumana esperantisto Mag. Sigismundo Pragano, membro de la Akademio de Esperanto, docento de Esperanto kaj de la rumana lingvo en la Universitato de Amsterdamo, famkonata internacia propagandisto kaj instruisto de Esperanto, mortis en la Wilhelmina-Hospitalo en Amsterdamo.

Jam de la komenco de marto, kiam li subite malsaniĝis dum lekcio en la universitato, kaj nur tuja kuracista helpo povis haltigi la minacantan katastrofon, kun kreskantaj zorgoj kaj malkreskantaj espero ni sekvis lian sanstaton. Terura malsano de ankoraŭ ne malkovrita kaŭzo lamigis lian preskaŭ tutan korpon, tiel, ke dum kelkaj tempoj nur per artefaritaj spirado kaj nutrado oni povis funkciigi en li la vivon ankoraŭ por kelkaj monatoj. Du operacioj, la unua komence de junio, la dua la 9-an de novembro, ne portis la atenditajn rezultojn. Feliĉe, li povis dum pli longaj periodoj legi kaj paroli, kaj bonfara konsolo estis por li la regulaj vizitoj de multaj liaj geamikoj. Speciale, ĝojigis kaj fierigis lin la brila doktoriĝo de lia talenta hinda studento, s-ro Aŝvinikumar* per sia Esperantolingva disertacio. Al ĉi tiu unika okazaĵo, la 2-an de novembro, oni transportis s-ran Pragano en lito al la ejo de la universitata solenajo.

Sigismundo Pragano estis unu el tiuj tre malmultaj homoj en la mondo, kiuj sian tutan vivon, jam de la frua juneco, metis en la servon de la lingvo kaj idealo de D-ro Zamenhof.

Li naskiĝis la 5-an de januaro 1907 en la rumana ĉefurbo Bukureŝto, kaj la unua semo de Esperanto falis en lian junan kaj idealistan animon la 28-an de aprilo 1923, kiam li kiel licea lernanto ĉeestis propagandan paroladon de la fama rumana Esperanto-pioniro Henriko Fischer. La Esperanto-Centro Rumana malfermis en tiuj tagoj serion de kursoj. Al unu el tiuj kursoj, kiu devis okazi posttagmeze en la liceo „Spiru Haret”, anoncis sin nur unu persono. Vidante la tro malgrandan interesigon mi diris al mia tiama brava

kunlaboranto Tiberio Morariu (nun vivanta en Stokholmo):

— Ni ne povas fari kurson por unu persono. Ni ŝparu la tempon kaj eĉ ne iru tien, sed telefonu al la lerneja pedelo, ke la kurso estas nuligita.

Sed s-ro Morariu ne samopiniis. Li respondis:

— Jes, sed eble li fariĝus bona esperantisto, kiu meritis la penon. Ni ne risku perdi homon, kiu povos esti valora por nia movado. Ni rigardu ne la kvanton, sed la kvaliton!

La vortoj de s-ro Morariu estis konvinkaj. Ni do iris al la lernejo kaj tie ni trovis la 16-jaran knabon: Sigismundon Pragano. La kurso okazis, ĉar li ne estis sola, sed portis kun si tutan grupon. Tiu kurso fariĝis unu el la plej fruktodonaj. El la kursanoj unu (f-ino Atias) gvidis poste kursojn en Rumanujo kaj Nederlando, alia (f-ino Harabagi) nun instruas Esperanton en Kalifornio.

La vortoj de s-ro Morariu montriĝis profetaj: efektive, la vorto „kvalito” karakterizis poste la tutan laboron kaj karieron de Sigismundo Pragano. Lian nomon kaj laboron konas kaj estimas la tuta esperantistaro. Post funda ellerno de la lingvo kaj akiro de la supera internacia diplomo (en Vieno, 1924) li komencis sian fervoran, vastan kaj altkvalitan laboron, unue en sia hejmlando, kaj fininte la universitatajn studojn de juro kaj ekonomio en Bukureŝto, Antverpeno kaj Parizo, ankaŭ en la eksterlando. En 1931 li venis en Nederlando kiel instruisto de la Internacia Esperanto-Instituto kaj baldaŭ fariĝis unu el la plej elstaraj kaj popularaj kursgvidantoj en diversaj landoj. Ĉe interkonatiĝoj dum kongresoj oni ofte povis aŭdi la fiere diritajn vortojn: „Mi lernis Esperanton de Pragano!” Tiu serioza kaj sukcesplena instrua laboro, kune kun lingvista klereco kaj klara vido en la labirinto de la gramatiko, kun samtempa literatura agado per sennombraj artikoloj kaj multaj tradukoj el la rumana literaturo, kun majstraj prelegoj kaj kursoj pri la Esperanta literaturo, ebenigis al li la vojon al la supro de brila kariero ĝis la membreco en la Akademio de Esperanto kaj la universitata katedro.

Al lia multflanka laboro apartenis ankaŭ partopreno en diversaj kulturaj movadoj, inter kiuj precipe la humanitarista movado fondita de la rumana filozofo kaj pacifisto Eugen Relgis (nun vivanta en

Urugvajo), kaj la mondfederalista movado, plue patriota servado al sia lando kaj popolo per kultura informado en internaciaj sferoj. Notinde estas ankaŭ, ke li estis kunlaboranto (pri rumana literaturo) de la nuntempe aperanta 20-voluma enciklopedio „Grote Winkler Prins” de Elsevier.

Kiam la morto de s-ro Pragano diskongiĝis, ĉies unuaj vortoj estis: „Kia granda bato por nia movado!” Tre pravaj vortoj! Nia movado perdis talentan, kompetentan kaj diligentan laboranton, kaj lia kolegaro ŝatatan kamaradon, kies karakteron ornamis ĉefe lojaleco kaj granda modesteco. Li laboris ĉiam senbrue, sen vanta ĉaso je populareco, honoroj kaj gravaj pozicioj. Sed per la rezultatoj de siaj laboroj li multe riĉigis nian movadon kaj starigis al si daŭran monumenton.

La funebrantoj trovu konsolon en la scio, ke nur tiuj mortas, kiujn oni forgesas. Sed dum en la mondo ekzistas esperantistoj, Sigismundo Pragano ne iĝos forgesita. Lia vivo fariĝis parto de la historio de la mondlingvo.

Andreo Cseh.

H. Vermuyten †

Laŭ „Heroldo de Esperanto” mortis komence de novembro 1966 s-ro H. Vermuyten el Antverpeno (Belgiujo), flandra esperantisto bone konata ankaŭ en L.E.E.N.-rondoj. Li estis regula gajmiena vizitanto de la iamaj Beneluksaj aranĝoj, pri kiuj li raportis - ofte tre trafe - en poezia formo en nia organo. Krome li tradukis multajn poemojn de flandraj kaj nederlandaj aŭtoroj. Lia kaŝnomo estis la anagramo *Tyneverum*.



SUBTENU LA MABESOONE-FONDAĴON!

Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccama-singel 294, Groningen. Poŝtĝirkonto: 81 58 89.

Federacio de Esperanto-organizo en Nederlando. Sekretariejo: Kenastraat 35, Utrecht-3. Tel. 0 30-44516.

Je la 23-a de novembro la kern-estraro de F.E.N. kunvenis en Hago. Punktoj de diskutado estis:

- a. La prelego „Kontaktaj kun la gazetaro” fare de s-ro Ganzenbrink, kiu plejble baldaŭ estos diskonigata en formo de presita raporto.
- b. La nuna pozicio de la Esp.-movado ĉe la nederlanda Radio. N.R.U., post peto niaflanka, promesis konsideri la eblon por kurso. Tiu ĉi eblo nun ne ekzistas ĉe A.V.R.O., sed nia peto estas notita.
- c. La propagando ĉe V.V.V. kaj N.S. En la unuenomita instanco s-ro Hans Bakker-patro jam atingis belan sukceson. Por N.S. la financado estas tikkla punkto. Ni klopodos solvi ĝin.
- ĉ. Komuna (stud)gazeto. La kernestraro opinias, ke estas necese daŭrigi klopodadon tiurilatan.
- d. Por kompilado de eventuala radiokurso kaj por akceli la eldoneblon de moderna nemultekosta vortaro, ni kontaktos kun kompetentuloj, sed tiaj ne estas dense semitaj.
- e. La broŝuro „Fund. feiten . . .” estus jam sendita al ministroj, parlamentanoj, se kabinetkrizo ne estus eksplodinta. Prokrasto plua tamen ne estus bona, tiel ke ĝi estos sendita malgraŭ la aktuala situacio.
- f. La sekretario klopodos por aktivigo de la specialaj komisionoj de F.E.N.

La sekretario:
J. Th. Punt.

Nova iniciato.

En la Roterdama semajngazeto „De Havenloods” de 17 nov. 1966 aperis artikolo pri kurso en Esperanto, gvidata de s-ro Calado en la antaŭurbo Schiebroek. Ĉar multaj personoj ne plu ŝatas fari longan vojaĝon al la urbocentro, s-ro Calado iniciatis kurson en la periferio de la urbo por atingi pli da personoj.

AL ĈIUJ, KIUJ INTENCAS VIZITI IZRAELON, KONGRESON, GREKUJON!!!

Sub aŭspicio de L.E.E.N. s-ro Kervers organizos en kunlaboro de la flugkompanio SABENA kaj la vojaĝoficejo Lissone Lindeman karavanon al IZRAELO (Tel Aviv) okaze de la 52-a Universala Esperanto Kongreso.

Leginte la programon vi certe devos diri ke la vojaĝo, restado ktp estos riĉenhava kun varioj.

Se vi havas la eblecon iri al la kongreso vi havas nun unikan okazon kombini flugi, ŝipveturi, viziti Izraelon, Cyprus kaj Grekujon.

Estu saĝa kaj kaptu tiun ĉi idealan eblecon!

PROGRAMO

31-7-'67 forveturo: Amsterdamo 09.20
per Sabena flugmaŝino.
alveno: Bruselo 10.05
f.: Bruselo 11.20
per CARAVELLE de Sabena.
a.: Tel Aviv 18.10
Per aŭtobuso al hotelo.

31-7-8-8 Restado en Tel Aviv (tranoktado kun matenmanĝo en ĉambro por 2 personoj, privata banujo dependas de la de vi elektita nivelo de la hotelo).
Dum ĉi tiu tempo oni estos tute libera (partopreni la kongreson, ekskursoj, ktp).

8-8 posttagmeze) Per aŭtobuso al Haifa por la forveturo (je la 22-a horo) per la luksa ŝipo „ENOTRA” al Piraeus voje de Larnaca (Cyprus).

11-8 Alveno en Piraeus (07.00 horo) Per aŭtobuso al hotelo (B-nivelo) kun kompleta pensio.
10.00 Tra Ateno per aŭtobuso (i.a. Akropolis, Nacia Muzeo, ktp) Posttagmeze: F a k u l t a t i v a vizito al la templo Poseidon (neforgesebla sunsubiron en Kabo Sounion!).

12-8 08.30 Per aŭtobuso de la hotelo al la flughaveno:
Per CARAVELLE (SABENA) de Ateno (10.35) al Bruselo kaj Amsterdamo.

Do: Flugi per CARAVELLE al Tel Aviv, restado dum la kongreso en Tel Aviv, 3 tagojn sur luksa ŝipo (riprozi en freŝa maraero, ekskurso en Ateno), flugi al Bruselo/Amsterdamo.

Veran libertempon kun sufiĉe varma unua parto kaj refreŝiga parto sur ŝipo. Estas ideala kombino! Ankaŭ ne-esperantistoj povos partopreni (unika ebleco por montri al ili la eblecojn de Esperanto!!!).

Prezoj:

Fl. 1095.—
(kun C-nivela hotelo en Tel Aviv)
Fl. 1180.—
(kun B-nivela hotelo en Tel Aviv)
Fl. 1250.—
(kun A-nivela hotelo en Tel Aviv)
Fl. 1520.—
(kun Luksa hotelo en Tel Aviv)

Inkluzive: transporto laŭ la programo, tranoktado en Tel Aviv kaj en Ateno, dupersonaj ĉambroj en Tel Aviv. Dum la 3-taga ŝipvojaĝo kompleta pensio (oni dormos en 6/8 personkajutoj, en 4 personkajutoj pli Fl. 40.—

Rimarkoj:

1. La vojaĝo realiĝos se minimume 25 personoj partoprenos.
2. Anoncado kiel eble plej baldaŭ. Lastan anoncon ANTAŬ 15-3-'67!
3. La unua pago ĉe la anonco estas Fl. 100.—
4. La tutan monsumon oni pagu antaŭ 1-6-1967.
5. Plilongigi la restadon en Tel Aviv kaj en Ateno estos eble (sub certaj individuaj kondiĉoj).

Ĉi tiu vojaĝo estas planita kaj estas realigota en kunlaboro de la flugkompanio SABENA kaj la vojaĝoficejo Lissone Lindeman. Komprenable la prezoj estas kun rezervo kun rilato al neatenditaj intertempaj prezŝanĝoj de ekz. hoteltarifoj en Izraelo, ktp.
**KAPTU ĈI TIUN UNIKAN OKAZON!
DECIDU TUJ!**

Pliajn informojn kaj anoncon ĉe:

H. Kervers, Prezidanto de L.E.E.N.
Van Slingelandtstraat 22.
's-Gravenhage (Nederlando).
Tel.: 54 21 86. Ĝirkonto: 46 74 01.

TRA LA LIBRARO.

VUK pribesta historio de István Fekete; el la hungara originalo tradukis Margit Leszkó. Eldonejo Corvina. Mendebila ĉe KULTURA, P.B. 149, Budapeŝt. Plaĉe tolbindita, 83 paĝoj, multaj dukoloraj bildoj de Pál Csérgesán, 12½ x 18½ cm, prezo \$ 1,50.

Jen aperis unu el la plej bonaj kaj ĉarmaj besthistorioj en Esperanto. Temas pri vulpido *Vuk*, postrestinto - kune kun fratino *Injo* - de vulponesto, detruita de la „kruela” *Glatĥaŭtulo*, la homo.

Atentostreĉe oni legas la travivaĵojn de la vulpoj, sukcese superruzantaj aliajn bestojn kaj la homon. Oni konatiĝas kun la nomoj de multaj bestoj kaj vegetaĵoj; tial la verketo estas samtempe bonega instruilo pri naturhistorio.

La verkinto estas unu el la plej konataj hungaraj aŭtoroj, kies bestromanetoj es-

Semajnfino de N.E.J. en Denekamp.

Nederlanda Esperanta Junulara (N.E.J.) organizas semajnfino en Denekamp. Ĝi okazos la 14-an kaj la 15-an de januaro 1967 en la junulargastejo tie.

Sabatvespere ni havos prelegon. Dimanĉmatene ni povos ĉeesti la diservon aŭ fari promenon. Posttagmeze ni faros ekskurson al Germanujo (do kunportu vian pasporton). Poste estos NEJ-kunsido. La kostoj estas gld. 10,—, ĉio inkluzive.

Neeltje Boersma.

La Nacia Kongreso de la Franca Esperanto - Asocio okazos dum Pentekosto 1967 en CALAIS.

Eksterlandaj vizitontoj ne pagos kotizon. Informoj haveblaj ĉe: S-ro J. Guillaume, 8, rue Camille Saulnier, 78-LE VESINET (S. et O.), Francujo.

Eŭropa Esperanto-Kongreso en INNSBRUCK, Aŭstrio. 23—30 julio 1967.

Temoj por diskuto: la Eŭropa Esperanto-Revuo; la Eŭropa Esperanto-Servo Turisma.

Kongreskotizo: 210,— aŭstr. ŝil.
Aliĝiloj haveblaj ĉe Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, 1150 Wien (vidu la anoncon sur p. 12 de tiu ĉi numero).

tas plej popularaj. Klare li montras sin granda naturamanto, funde scianta naturajn fenomenojn kaj la ecojn de la priskribitaj bestoj.

La traduko estas bonega kun multaj trafaj kaj nuanceriĉaj esprimoj kaj priskriboj. Kelkloke nur oni renkontas iujn neklaraĵojn (hungarismojn?) aŭ preserarojn. Tre taŭga libreto por pliaĝaj infanoj, sed - pro stilo kaj lingvo - ankaŭ por pliaĝuloj. Eĉ mi povas rekomendi ĝin por laŭtlegado en grupvesperoj pro instrua enhavo. Nur unu rimarkon mi havas: la prezo, laŭ nederlanda normo, estas sufiĉe alta.

P. M.

DUDEK HOROJ, Kroniko, de Ferenc Sánta. El la hungara tradukis: V. Benczik, I. Botos, L. Somlai, L. Tárkony. Redaktis: K. Kalocsay. Eld. de Corvina, Budapeŝt, 1966. 236 paĝoj, 9,3 x 16 cm., bindita. Prezo: Us. dol. 1,90. Kolportisto: KULTURA, P.B. 149, Budapeŝt. Havebla ĉe nia libroservo.

Ĝi estas libro tre originale komponita kaj donas bildon pri la vivo en nuntempa Hungarujo laŭ la fadeno de la travivaĵoj en 20 horoj. Ĉar tiu tago en si mem ne estas eksterordinara, ĝi povas esti interesa nur pro la rakontoj de pluraj personoj pri la pasinteco. Iasence ĝi estas kadra rakonto, sed dum ekz. en „1001 noktoj” la rakontoj estas tute sendependaj unu de la aliaj, ĉi tie ili ĉiuj temas pri la eventoj en la sama vilaĝo la lastajn dekojn da jaroj kaj kompletigas sin al kompleta bildo de la vivo en tiu vilaĝo.

Malmulte ĝi atentigas la animan vivon de la personoj, ĉefe ilian eksteran konduton. Kritikon je la komunismo ĝi ne ŝparas, kaj multan malkontenton pri la komunismo ĝi raportas. Kelkaj ĉapitroj, ekz. la raporto pri la estrara kunsido de la Agrara Kooperativo (ĉ XVI) estas tedaj, sed ĝenerale ĝi estas tre leginda.

W. A. Verloren van Themaat.

LA ESPERANTA KONJUGACIO, de Teo Jung, kun pli ol 1000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj, kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri la kunmetitaj verboformoj. Prezo por la du volumoj kune 13,50 g. plus 10% por sendkostoj. Sola volumo ne mendebila. Eld.: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. Dua parto, 122 kvartformataj paĝoj. ĉ. 21 x 27 cm. (La unua parto jam aperis, vidu „N.E.” de junio 1966, p. 58).

La aŭtoro enkondukas tiun ĉi parton, rememorante kion li jam montris en la unua parto, ke pli ol 99,8% de la Zamenhofaj konjugaciaj formoj estas tempaj aŭ almenaŭ tempe klarigeblaj, do respondas al la tempindikoj de la 6a regulo de nia gramatiko. Al tiu konkludo li venis per ekzakta esplorado de 14 verkoj de Zamenhof. Kvankam pluraj el tiuj ekzemploj estas klarigeblaj ankaŭ laŭ la aspekta sistemo - kiu fakto kompreneble havigas al itistoj ŝajnan pravon por iliaj asertoj - tio neniel tuŝas la konkludon de s-ro Jung, ĉar Zamenhof ja parolis nur pri tempoj, neniam pri aspektoj. Sed la konstato de s-ro Jung pruvas ankaŭ ke lia rezonado estas sufiĉe elasta, ni povas diri: kompromise al la itistoj. La itista starpunkto kontraŭe restas rigora, hereziganta ĉiun alian opinion. La aŭtoro ne neglektas la rolon de aspektoj en la lingvo, eĉ konsentas ke pluraj formoj povas esti samokaze tempaj kaj aspektaj, kio tamen ne povas signifi ke ni rajtas bazigi la konjugacion sur la sistemo de aspektoj. Tia ago signifus nur herezan rompon de unu el la fundamentaj principoj. La aŭtoro konstatas i.a. jenajn faktojn: ĉe la kompilado de Plena Vortaro s-ro Waringhien evidente ne jam pensis pri itismo, do tiu ideo nur poste naskiĝis ĉe li; dum 70 jaroj la esperantistoj vivis en toleremo, kaj neniu ekpensis pri herezigo de iom deviaj vidpunktoj ĝis la momento kiam ili en la 3a eldono de Plena Gramatiko povis legi, ke ilia logika kaj laŭfundamenta uzado de pasivaj participoj estas „reformo” kaj „herezo”; ke post tiam la itistoj per minacoj, insultoj kaj anatemoj klopodis diktatore trudi al la esperantistaro sian devian vidpunkton. Tiel estiĝis la nuna, por la progreso de Esperanto tre danĝera situacio. Kompromisaj proponoj neniel sukcesis. La intense kreita situacio estas minaco al Esperanto: ĉu racie pensantaj homoj adoptos lingvon kiu - laŭ aspekta koncepto - eĉ per 6 participoj ne povas esprimi logikan diferencon inter ata kaj ita?

Atentinda tiurilate estas la „modela” frazo de Waringhien: „Oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita”, kiu frazo logike povas havi nur unu signifon: ke la operacio jam okazis antaŭ lia transporto en la hospitalon, do nepre sensencan. Nur „operaciata” esprimas la logikan sinsekvon de la agoj. Inter la amaso da Zamenhofaj ekzemploj de -is

-ita-formoj en relativaj propozicioj s-ro Jung trovis eĉ ne unu kiu konfirmas la itistan aserton. Kontraŭe, la pluskvamperfekton -is -ita, kiun la itistoj neglektas, oni trovas amase ĉe Zamenhof.

Traleĝinte tiun ĉi riĉe dokumentitan verkon, oni ne povas ne konfesi, ke la aspekta klarigo de la itistoj estas nepre kontraŭa al la 6a regulo de la fundamento. Kiu sentas ankoraŭ dubon, havigu al si tiun ĉi verkon; li kontribuos al malhelpo ke okazu danĝera skismo en la movado.

G. J. Degenkamp.

ESZPERANTÓISKOLAI KIFEJEZÉSEK GYŰJTEMÉNYE/LERNEJAE SPRIMARO ESPERANTA, kompilita kaj tradukita de D-ro Nagy István, kun enkonduko de Pechan Alfonz. 14 x 20 cm., 20 p., broŝurita. Eld. de Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt 1966 (adreso: Kenyérmező u. 6, Budapeŝt VIII, Hungarujo). Prezo 1,50 stelo = gld. 0,38.

En sia enkonduko Pechan Alfonz diras, ke estas dezirinde ke dum la Esperantolecionoj la lernantoj kiel eble plej baldaŭ kaj multe praktiku la instruatan lingvon. Por helpi la instruantojn oni tiucele kolektis en ĉi tiu broŝuro la plej multe uzatajn lerneajn esprimojn, kiel ekz.: Malfermu viajn librojn kaj atentu la tekstojn aŭ: Ĉu vi kopiis la vorton, la frazon, la parton? La frazoj estas ordigitaj laŭ la irado de la leciono.

La listo povus eble esti taŭga helpilo ankaŭ en nia lando.

H. G.

„KEMIO INTERNACIA”

Volonte ni denove atentigas pri la esperantlingva scienca fakrevuo „Kemio Internacia” (vidu la recenzon en „N.E.” de dec. 1965, p. 112).

La revuo estas eldono de la Urugvaja Esperanto-Societo. Plejparto de la artikoloj publikigitaj estas originalaj. Resumoj regule aperas en „Chemical Abstracts” (Usono), „Chemisches Zentralblatt” (Germanujo) kaj „Referativny Zhurnal (Sovet-Unio).

La eldonantoj petas kunlaboron: Esperanto-societoj ekz. povas abonigi aŭ mem aboni la revuon por faksciencaj institucioj aŭ bibliotekoj.

Oni volonte akceptas novajn aktivajn kunlaborantojn. Bonvolu memori ke „Kemio Internacia” ne estas popularscienca revuo.

ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

Studo pri la objektiva bezono kaj la eblecoj de internacia lingvo.

Projekto de rezolucio.

prezentita de Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedlando
je 19 novembro 1966.

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante ke la nombro de ŝtatoj kreskas rapide dum la jaroj kaj samtempe la bezono faciligi la kontaktojn inter la disersaj nacioj kaj popoloj,

Notante, ke la bezono de pli bonaj komunikiloj inter la popoloj kaj ke la neceso pri internacia terminologio kreskas en teknikaj sferoj,

Rekonante ke tiu problemo kreskas de tago al tago kaj ke UNESKO estas la ĝusta organo por studi tiun aferon, kiu estas grava el socia, kultura kaj teknika vidpunkto,

Rekomendas al la Ĝenerala Direktoro antaŭvidi necesajn monrimedojn en la laborprogramo kaj la budĝeto por 1969-1970 por funkciigi internacian komisionon konsistantan el pedagogiaj, lingvaj kaj teknikaj ekspertoj por objekte studi, en kiuj sferoj estas bezono de internacia lingvo kaj esplori per kiuj komunikiloj estus eble kontentigi tiun bezonon.

Rimarko: Pro la amasiĝo de proponoj, la Konferenco bedaŭrinde decidis *ne voĉdoni* pri tiuj proponoj, kiuj temas pri „La estonta programo”, sed transdonis ilin al la Ĝenerala Direktoro por prijuĝo.

En ĉiu okazo nun denove aktualiĝis en UNESKO, la supera kultura organo de la mondo, la problemo de internacia lingvo.

Pro la oficiala karaktero de la afero, la esperantistoj bonvolu *ne* sendi gratul- aŭ dankleterojn al iu ajn. Cetere ni ankoraŭ ne estas certaj, ke UNESKO funkciigos komisionon, kaj fine ni nur post pluraj jaroj povos havi la rezulton de la komisiona laboro. Tamen la ŝtono nun ekruliĝis!

La adreso de „Urugvaja Esperanto-Societo” estas: Casilla de Correo 1040, MONTEVIDEO, Uruguay.

NI RICEVIS:

POR LA PACO V, diversaj aŭtoroj. Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj. Eld. de Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, MOSKVO, ul. KALININA, SOD, otdel kultury, 1966. 14 x 20½ cm., 96 p., broŝurita, multobl. Prezo ne indikita.

TAGKAJERO EN PRIZONO de Ho Chi Minh. Poemaro, tradukita de Dao Anh Kha. Eld. Fremdlingva Eldonejo Hanojo, 1966. 106 p. Prezo ne indikita.

INDAJ GEFILOJ DE LA LAO-POPOLO. Neo Lao Haksat-eldonejo, 1966. 99 p. prezo ne indikita.

PRI „TRIFAMILIA VILAĜO” - La Reakcia Esenco de Noktaj Babiloj ĉe Janŝan, kaj: Notoj de Trifamilia Vilaĝo, de Jaŭ Venjuan. Eld. de Fremdlingva Eldonejo Pekino. ĉ. 9 x 14½ cm., 58 p., broŝ. Prezo: gld. 0,40.

ALTE TENU LA GRANDAN RUĜAN FLAGON DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG, AKTIVE PARTOPRENU EN LA GRANDA SOCIALISMA KULTURA REVOLUCIO. Ĉefartikolo de Jiefangjun Bao (Ĵurnalo Liberiga Armeo, 18-a aprilo 1966). Sama eldonejo kaj formato kiel antaŭa broŝuro. 30 p. Prezo: gld. 0,25.

ĈESKOSLOVENSKO/KARLOVY VARY. Turista broŝuro pri la konata ĉeĥoslovaka banurbo. Kun proks. 25 paĝoj kaj multe da ilustraĵoj. Aldone ni ricevis: INFORMA POŝLIBRO por gastoj de la banurbo KARLOVY VARY. 48-paĝa tre detala informilo pri turistaj aranĝoj, kun i.a. informoj pri hoteloj, prezoj, banejoj, k.t.p. Adreso: Informservo, Karlovy Vary, Jednothych Odboru 43, ĈSSR.

INTERTAAL 1966-1967. Eld. de Intertaal, Van Baerlestr. 150, Amsterdam-Z. Katalogo de librejo, specialiĝinta en lernolibroj de tre multaj diversaj lingvoj, i.a. ankaŭ Esperanto.

ĜENERALA NEDERLANDA
ESPERANTO-EKZAMEN-KOMITATO

M1. Amersfoort, 28 majo 1966.
Traduku (2-a—4-a h.):

Antaŭ ne longe mortis sinjorino Matelot, kiu estis 70-jara. Iam estis ŝia nomo tre famkonata kaj ĉiulandaj ĵurnaloj rakontis kun multe da emocio la heroan agon de tiu virino.

En la jaro 1910-a iun nokton la lumturgardisto Alexandro Matelot falas de la ŝtuparo en la lumturo kaj svenas. Momenton poste sinjorino Matelot rimarkis ke la lumo ankoraŭ ne brilas kaj ke la lanternego ne turniĝas. Ŝi volas scii, pro kio. Tuj poste ŝi trovas sur la ŝtuparo sian svenintan edzon. Ŝi portas lin sur lian liton.

Sed rapidege eknoktiĝas kaj ekstere ŝtormas. Kaj ankoraŭ neniu eklumigis la lampon. La virino subite pensas pri katastrofoj, kiuj povus okazi pro la ne-funkciado de la lanterno.

Ŝi supreniras, plenigas la lanternon kaj lumigas ĝin. Sed ĝi devas turniĝi. Pro tio servas iu meĥanismo, kiun ŝi ne povas funkciigi, ĉar la ŝlosilo estas netrovebla. Nun ŝi vokas siajn infanojn, du knabojn, kiuj estas ankoraŭ ne dek-jaraj kaj montras al ili, kiel ili turnu la lanternon. Tio estas fakte tro malfacila laboro por du infanoj, sed devas okazi.

La vento furioze blovas, la ondegoj terure muĝas. Malgraŭ tio la infanoj turnas la aparaton. Dume sinjorino Matelot, kiu malsupreniris, flegis la edzon. Ve, ĉirkaŭ noktomezo la malfeliĉulo mortas.

Al li la okulojn ŝi fermas, la manojn ŝi kunigas. Plenuminte tiun taskon, plendolora ŝi denove pene supreniras la krutan ŝtonŝtuparon. Malespera pro ĉagreno, ŝi tamen sufiĉe da forto havas por turni la lanternegon dum la tuta nokto. Ŝi ne volas, ke la morto de ŝia edzo okazigu la morton de aliaj homoj, kiuj tranoktas sur la maro.

M2.

Traduku en Esperanton (10-a—12-a h.):

Hoe de prentbriefkaart werd uitgevonden. Wie staat er in onze tijd van opzienbarende uitvindingen nog stil bij de oorsprong van een zo alledaags gebruiksartikel als de prentbriefkaart? Toch zouden zelfs Edison en Marconi er zich niet op kunnen beroemen, dat hun uitvindingen da-

gelijks in zoveel miljoenen exemplaren over de gehele wereld worden verspreid als die van de boekdrukker Schwarz uit Oldenburg.

De heer Schwarz was een gezellige man. Hij was een trouw lid van een kegelclub en een even trouw bezoeker van de „Bierstube”. Maar toen in 1870 de Frans-Duitse oorlog uitbrak, zag hij verscheidene van zijn jonge vrienden naar de kazernes verdwijnen. Om de conversatie gaande te houden stuurde Schwarz zijn vrienden briefkaarten na. En om die briefkaarten een actueel karakter te geven, drukte hij in de linker bovenhoek, tegenover de postzegel, een passende illustratie: een Duitse soldaat met een kanon er bij. Dat kon hij gemakkelijk doen, want hij was zelf boekdrukker en in zijn drukkerij had hij nog een oude houtsnede met een kanonnier er op.

De Duitse soldaten zongen in die oorlogsdagen op de melodie van een Franse gavotte de woorden:

Een kip kan geen druppel water slikken zonder naar de hemel te blikken.

Hij drukte zo'n naar de hemel kijkende kip op briefkaarten en stuurde die naar het front. Het succes was enorm!

Onze Oldenburger boekdrukker had er trouwens niet het flauwste vermoeden van, dat hij een uitvinding had gedaan, die zich over de gehele wereld zou verbreiden. Hij vond alleen het denkbeeld reusachtig grappig.

Naar: „De Verzamelaar”.

KORESPONDPETOJ.

47-jara sveda laboristo dez. kor. kun nederlandanino, i.a. pri literaturo, arto kaj naturo. Adr.: Arne Bengtsson, Abybergsgatan 32, MÖLNDAL, Svedlando.

Zoltán Lépö, 20 jara, adr.: BUDAPEST, VII. Ker. Vörösmarty u. 2 11/21, Hungarujo, dez. kor. kun Nederl. gejunuloj pri filatelio, kol de pk., artobjektoj k.t.p.

MULTAJ GEESPERANTISTOJ 10-60-j. (lernantoj, geinstruistoj, profesoroj) serĉas fidelajn geamikojn en t.m. Skribu amase: S-ino St. Majerczak, ul. Kingi 71, Kroscienko n/ Dunajcem, Pollando.

GEKOMENCANTOJ, junaj k pliaĝaj, dez. kor. per bk. kaj leteroj kun ĉ.l. Skribu al Karola Rossetti, 120 Cromwell Rd., Bristol 6, Anglujo.

ORIGINALA ESPERANTO-POEZIO

EL ĈINUJO.

Pri la aŭtoro:

Armand Su naskiĝis 19 nov. 1936 en Pekino. Li lernis Esperanton en 1956. Krom E. li scipovas multajn fremdlingvojn.

Kiel poeto en la E.-revuoj li debutis en 1960 en „Norvega Esperantisto”. Nuntempe li loĝas en Tientsin, Ĉinujo. Li estas delegito de U.E.A. kaj komitata-ano de T.E.J.O.

En „Nederlanda Esperantisto” de julio/aŭg. 1966, p. 66, ni jam publikigis kelkajn aforismojn de li.

ARMAND SU

KORO KAJ KARNO

En brust' ŝia mortis jam la koro,
kiu pro mi flamis arde iam
en la plej feliĉa ekstaz-horo.

Sed nun restas nur la nuda karno.
Al statu' senvesta samas ŝi jam.
Ne plu la interna bel' kaj ĉarmo.

(julio, 1964)

POST ŜIA PERFIDO

Tago de gefianĉiĝo*,
tago de mia feliĉo,
de ĝi jam nenio restas,
kaj mi ree sola estas!

Oĥ, al kiu mi konfidas
la doloron en korfundo?
Kiu scias, kiu vidas,
kiom granda mia vundo!

(1964)

* Armand Su fianĉiĝis al Carol C. je la 30.11.1963 kaj la gefianĉiĝo nuliĝis en 1964.

SUR LA PARKBENKO

Sur la benk' mi sola kuŝas,
kaj la man' nur ŝtonon tuŝas.

Kies voĉo min konsolas
kaj tenere alparolas?

Nur la foli-susureto
plendas pri l'sort' de l'poeto.

(1964)

Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la antaŭa monato. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.

KONCIZE

La komputilo estas maltaŭga tradukanto. Usona registara komisiono konkludis, ke ne estas eble instrui al komputilo fari taŭgajn tradukojn. La produkto de la maŝino estas nelegebla kaj bezonigas retradukadon fare de la homo.

Oni eksperimentis dum dek jaroj tradukante el la rusa en la anglan. La kostoj sumiĝas je sepdek milionoj da guldenoj. La finkonkludo de la komisiono estas: prefere oni mem lernu rusan.

(Arnhemse Crt., 5-12-1966).

Esperanto kaj Filmarto.

Ĉe Studio de Belartaj Filmoj en Wroclaw fondiĝis Rondo de Pola Esperanto-Asocio al kiu aliĝis 96 personoj. Parto jam finis E-kurson. Membroj volonte korespondos. Adreso: Pola E-Asocio, Rondo ĉe Studio de Belartaj Filmoj, WROCLAW, str. Wystawowa n-ro 1, Pollando.

Internacia Renkontiĝo dum la foiro en Leipzig.

Esperantistoj vizitontaj la printempan foiron 1967, sabaton vespere, la 11-an de marto, havos okazon en Leipzig esti en rondo de esperantistoj.

Pro detalaj informoj oni skribu al: Esperanto-amikoj en la Germana Kulturligo, GDR 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Strato 115.

LIBROJ PER TELEFONO.

La Universitato de Delft, Nederlando, estas la unua, kiu rajtas fieri pri „aŭtomata” biblioteko. La studentoj bezonas nur turni la numeron de la bezonata libro per unu el ses specialaj telefonoj instalitaj en la kataloga ĉambro, kaj la libron mem ili ricevas en malpli ol duona minuto.

Sistemo de lum-indikiloj montras al deĵoranto de la koncerna etaĝo, kie la libro troviĝas. Se la libro ĉeestas, la deĵoranto metas ĝin sur deglitolon, kiu portas ĝin al la teretaĝo; se ĝi mankas, oficisto de la kataloga ĉambro ricevas signalon.

Laŭdire la nova sistemo mallongigis la mezan tempon de atendado de 40 minutoj ĝis 16 sekundoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

NED. ESPERANTISTEN-VERENIGING „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Prez.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.

Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.

Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15. Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver. L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

KONCIZE (*daŭrigo*).

Speciala Esperanto-poŝtstampo.

En „N.E.” de dec. 1966 ni sciigis, ke okaze de la kongreso de Sveda Esperanto-Federacio je Pentekosto 1967 estas eldonita karto de glumarkoj.

Nun oni informis nin, ke ankaŭ estas eble mendi kovertojn kun speciala esperanto-poŝtstampo uzota dum la tri kongrestag-oj. La prezo por unu koverta kun E-pŝt. kaj unu karto de glumarkoj estas 3 internaciaj respondkuponoj. Bonvolu mendi ĉe E-klubo de Norrköping, Poŝtfako 49, Norrköping, Svedujo.

Nova eldono de la Utreĥta Esperanto-Komitato.

Okaze de la inaŭguro de la Zamenhof-monumento en Utrecht, la UEK donacis fotografajon al ĉiu, kiu en iu ajn maniero kunlaboris.

Por tio ni mendis 500 ekzemplerojn. Poste montriĝis ke restis kelkaj en stoko, kiujn ni forvendis. Dum la vendado ni rimarkis, ke la peto estis pli granda ol la kvanto. Tial ni mendis ankoraŭ 500. Do, se iu ŝatas posedi foton de la monumento oni povas ĝin mendi ĉe la kasistino: s-ino Van Iperen-De Vries, Nassaustraata 43, Utrecht.

La prezo estas: rekte de la kasistino 5 por *f* 1,—, 25 por *f* 3,75.

Per ĝiro „Utreĥta Esperanto-Komitato”, numero 53 50 66: 4 por *f* 1,—, 25 por *f* 4,25.

F. J. Bergman, sekretario UEK.

Post „Frisaj Rakontoj”.

Frisaj esperantistoj preparas nun la eldonon de sekvantaj libroj: „Dorse kontraŭ

la muro” (rezistmovado dum la lasta mondmilito), „Frisa Antologio”, „Vortaro Esperanto-frisa”, „Jen Frislando” (dokumenta broŝuro).

Esperanto en Komerco - kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.

Esperanto - Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

KARAVANESTRO SERĈATA

kiu gvidos samideanaron al la EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO 1967 en INNSBRUCK.

Interesitoj skribu al: Esperantista Federacio Fünfhausegasse 16, 1150 WIEN, Aŭstrio.

SKRIBA KURSO POR LA E-DIPLOMO

en kunlaboro kun la

Leidse Onderwijs Instellingen

Informoj kaj aliĝoj nur pere de nia sekretariino:

S-ino J. C. Heetkamp-Senstius
Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.
Tel.: 0 70 - 66 96 69.